FORMATO MARC 21

GVIDILO POR ĜIA UZADO EN KATALOGADO

ANA MANERO

Versio: 01. 2024

FORMATO MARC 21

GVIDILO POR ĜIA UZADO EN KATALOGADO

Ana Manero

(Versio: 01)

2024

Verkis: Ana Mª Manero García (biblioteko@esperanto.es)

Helpis per reviziado: Marc Vanden Bempt kaj Ruben Fernández

Formato MARC 21

Tabelo de enhavo

Formato MARC 21 3
Tabelo de enhavo 3
Enkonduko 6
BIBLIOGRAFIA RIKORDO 7
000-Kapo 7
Kontrolkampoj 7
001 – Kontrolnumero 7
003 – Identigilo de la kontrolnumero 7
005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo 8
006 – Informkodoj de fiksa longeco. Pliaj karakterizaĵoj de la materialo 8
007 – Fiksa kampo de fizika priskribo. Ĝenerala informo 8
008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo 8
Komunaj pozicioj por ĉiuj materialoj 8
Pozicioj 18-34 specifaj por libroj 11
Pozicioj 18-34 specifaj por komputilaj dosieroj 14
Kampoj pri numeroj kaj kodoj 14
020 – ISBN (International Standard Book Number = Internacia Norma Libro-Numero) (R) 14
040 – Fonto de la katalogado (NR) 15
041 – Lingvokodo (R) 16
Kampoj rilataj al la bibliografia priskribo 18
240 – Unuforma titolo (NR) 18
243 – Kolektiva unuforma titolo (NR) 19
245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco (NR) 20
250 – Mencio pri eldono (R) 23
264 – Produktado, Publikigo, Distribuado, Fabrikado kaj Kopirajto (R) 23
300 – Fizika priskribo (R) 25
336 – Tipo de enhavo (R) 26
337 – Tipo de medio (R) 26
338 – Tipo de portilo (R) 27
490 – Mencio pri serio (R) 28
Kampoj pri notoj 29
500 – Ĝenerala noto (R) 29
502 – Noto pri disertacio (R) 29

504 – Noto pri bibliografio (R) 29
505 – Noto pri enhavo (R) 30
546 – Noto pri lingvo (R) 31
Kampoj rilataj al la alirpunktoj 32
Ĉefaj 32
100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono (NR) 32
110 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de korporacio (NR) 33
111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso (NR) 33
130 – Ĉefa alirpunkto. Unuforma titolo (NR) 34
Sekundaraj 35
700 – Sekundara alirpunkto. Nomo de persono (R) 35
710 – Sekundara alirpunkto. Nomo de korporacio (R) 35
711 – Sekundara alirpunkto. Nomo de kongreso (R) 36
730 – Sekundara alirpunkto. Unuforma titolo (R) 36
740 – Sekundara alirpunkto. Nekontrolita/analiza titolo (R) 37
AŬTORITATA RIKORDO 39
000-Kapo 39
Kontrolkampoj 39
001 – Kontrolnumero 39
003 – Identigilo de la kontrolnumero 39
005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo 39
008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo 39
Kampoj pri numeroj kaj kodoj 39
024 – Aliaj normaj identigiloj (R) 39
040 – Fonto de la katalogado (NR) 40
Kampoj pri ĉefaj alirpunktoj 40
100 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de persono (NR) 40
110 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de korporacio (NR) 42
111 – Ĉefa alirpunkto. Nomo de kongreso (NR) 43
130 – Ĉefa alirpunkto. Unuforma titolo (NR) 45
Kampoj por nomovariantoj – Referenctipo: Vidu. (R) 46
Kampoj por nomovariantoj – Referenctipo: Vidu ankaŭ (R) 47
Kampoj por starigi kompleksajn referencojn 48
663 – Kompleksa referenco: Vidu ankaŭ (NR) 48
Kampoj pri notoj 49
670 – Noto pri konsultita fonto (R) 49

RIKORDO PRI LA EKZEMPLERO 50
000-Kapo 50
Kontrolkampoj kaj kampoj pri numeroj 50
003 – Identigilo de la kontrolnumero 50
005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo 50
008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo 50
040 – Fonto de la katalogado (NR) 50
Kampoj pri notoj kaj lokalizo 50
561 – Historio pri proprieto kaj prizorgo (R) 50
563 – Informo pri la bindaĵo (R) 51
852 – Lokalizo (R) 51

Enkonduko

Trovu en ĉi dokumento detalan instrukciaron por kodigi informon en bibliografiaj, aŭtoritataj aŭ priekzempleraj rikordoj.

Priskribo pri la formato mem, la strukturo de MARC-rikordo kaj la maniero labori per ĝi troviĝas en la responda enkonduko de la *Manlibro pri katalogado*.

La dokumento enhavas nur la plej uzatajn kampojn, provizore nur por la katalogado de monografioj en la kazo de la bibliografiaj rikordoj. En postaj eldonoj, oni aldonos pliajn specifajn kampojn por alispecaj materialoj, kiel seriaĵoj, sonregistraĵoj kaj videoj. Kaze, ke vi ne trovos respondon en ĉi mallongigita gvidilo, konsultu rekte la originalajn formatojn, kies retaliraj ligiloj troviĝas komence de la respondaj ĉapitroj.

BIBLIOGRAFIA RIKORDO[1]

000-Kapo

Ĝi havas 24 poziciojn komenciĝantajn per 0. Ĉar kelkaj valoroj aperas implicite en la sistemo, ni devas kontroli, ĉu tiuj valoroj taŭgas por la materialo kiun ni katalogas en ĉiu momento. Koha disponas malfaldeblajn menuojn por la modifeblaj pozicioj.

Ni devas zorge kontroli la poziciojn 06 (tipo de rikordo), 07 (bibliografia nivelo), 17 (nivelo de kodigo) kaj 18 (formo de priskriba katalogado).

Ĉar en esperantaj bibliotekoj la plej abunda materialo estas teksta, la valoro en la pozicio 06 estos ofte "a"(teksta materialo). Tiu valoro enestas implicite en Koha, kiam oni malfermas novan rikordon. Se oni katalogas videon, sonregistraĵojn, partituron, ktp., oni ne forgesu ŝangi tiun valoron por la valoro taŭga en ĉiu kazo.

En la pozicio 07 oni kodigas la bibliografian nivelon, kiu respondas al la karaktero monografia aŭ seriaĵa de la materialo katalogata. Ekzemple, se oni katalogas filmon aŭ diskon, la karaktero estas ĝenerale monografia, sed se temas pri songazeto, la karaktero estas seriaĵa, ĉar simila laŭ ĝiaj trajtoj al paperaj revuoj aŭ periodaĵoj. La implicita valoro en Koha estas "m" (monografio).

La nivelo de kodigo, en pozicio 17, estu "kompleta nivelo", reprezentita per blanko (#). La implicita valoro de Koha estas "7" (minimuma nivelo), ni devas ŝanĝi ĝin krom se ial oni deziras alian katalogan nivelon por certa tipo de materialoj.

Kaj fine, en la pozicio 18, la implicita valoro estas "a" (AACR 2), kiun ni devas ŝanĝi al "i" (ISBD kun interpunkcio)[2].

Kontrolkampoj

001 – Kontrolnumero

Kontrolnumero asignita al la rikordo aŭtomate generita de la sistemo.

La kontrolnumero en Koha, tamen, ne estas kodigita en la kampo 001 de la bibliografiaj rikordoj, sed en propra kampo (biblionumber) mastrumita interne de la sistemo, kiu nur videblas en la responda url de ĉiu rikordo:

https://bibliotekojrp.esperanto.es/cgi-bin/koha/opac-detail.pl?biblionumber=387

Tio, tamen, ne malhelpas la normalan funkciadon de la programo. Kurioze, tamen, Koha ja provizas tiun kontrolnumeron en la kampo 001 de la aŭtoritataj rikordoj.

003 – Identigilo de la kontrolnumero

MARC-kodo de la biblioteko aŭ kataloga centro. Kutime ĉi-kodo estas aŭtomate generita de la sistemo, se oni agordas ĝin.

---

[1] https://www.loc.gov/marc/bibliographic/

[2] La valoro "c"(ISBD sen interpunkcio) povas taŭgi por tiuj sistemoj, kiuj permesas aŭtomate aldoni la interpunkcion, jen integrante ĝin en la rikordon mem, jen per surfaca tavolo, kiu montras la interpunkcion en la ekrano sen efektive aldoni ĝin al la rikordo. Momente, Koha ne havas tiun eblecon. Sed se oni katalogas per iu alia programo, kiu tion permesas, bone notu, ke la interpunkcio ligita al kelkaj subkampoj (ekzemple 245$b) estas variebla. En tiuj kazoj, indas tajpi la varieblan interpunkcion, ĉar la sistemo ne povas per si mem distingi tiun, kiu estas konvenan en ĉiu kazo.

Multaj bibliotekoj uzas ĉi-kampe neoficialan kodon kaj verŝajne por la plej granda parto de Esperanto-bibliotekoj tio sufiĉas[3]. Tamen, por gravaj biblioteko el historia kaj enhava vidpunkto, estas konsilinde peti ĝin de la koncerna agentejo: MARC Codes for Organizations[4]

Ĝi estas agordebla en Koha por ke ĝi registriĝu aŭtomate en la kampo.

005 – Dato kaj horo de la lasta modifo de la rikordo

La kampo enhavas 16 karaktrojn kiuj indikas la daton kaj horon de la lasta modifo de la rikordo. Ĝi estas aŭtomate generita kaj ŝanĝita de la sistemo laŭbezone.

006 – Informkodoj de fiksa longeco. Pliaj karakterizaĵoj de la materialo

La elementoj estas difinitaj per sia pozicio. La nedifinitaj pozicioj enhavas blankon (#). Ĉiuj difinitaj pozicioj devas enteni kodon, kiu foje povas esti pleniga karaktro (|), kiu signifas, ke oni ne donas prian informon, kiam la biblioteko ne deziras kodigi tiun pozicion.

Ne bezonata en rikordoj pri tekstaj materialoj. Klarigoj pri ĝi aperas en la koncernaj ĉapitroj.

007 – Fiksa kampo de fizika priskribo. Ĝenerala informo

La elementoj estas difinitaj pro sia pozicio. La nedifinitaj pozicioj enhavas blankon (#). Ĉiuj difinitaj pozicioj devas enteni kodon, kiu foje povas esti pleniga karaktro (|), kiu signifas, ke oni ne donas prian informon, kiam la biblioteko ne deziras kodigi tiun pozon.

Ne bezonata en rikordoj pri tekstaj materialoj. Klarigoj pri ĝi aperas en la koncernaj ĉapitroj.

008 – Informkodoj de fiksa longeco. Ĝenerala informo

Provizas kodigitan informon pri la rikordo kiel tuto kaj pri kelkaj specialaj bibliografiaj aspektoj de la katalogata risurco. Ĝi havas 40 poziciojn komenciĝantajn per 0. Kelkaj el ili estas specifaj por la diversaj tipoj de materialoj.

La elementoj estas difinitaj pro sia pozicio. La nedifinitaj pozicioj enhavas blankon (#). Ĉiuj difinitaj pozicioj devas enteni kodon, kiu foje povas esti pleniga karaktro (|), kiu signifas, ke oni ne donas prian informon, kiam la biblioteko ne deziras kodigi tiun pozicion. Tamen, ĝi ne uzeblas en la pozicioj 00-05, dato de eniro en la sistemo kaj ĝia uzado ne rekomendindas en la pozicioj 07-10 (unua dato) kaj 15-17 (eldonloko).

Komunaj pozicioj por ĉiuj materialoj

00-05 Dato de eniro en la sistemo *(aŭtomate generita)*

Ses karaktroj, laŭ la ŝablono: *jjmmtt* (jj, por la jaro; mm, por la monato; tt, por la tago)

06 Tipo de dato/stato de la eldonitaĵo

Alfabeta kodo unukaraktra. Ĝi indikas la tipon de dato donitan en la sekvaj pozicioj; por seriaĵoj, ĝi indikas ankaŭ la staton de la eldonaĵo (ĉu jam fermita aŭ daŭre publikigata). Ĝia uzo estas en rilato kun la informo aperanta en la subkampo $c de la kampo 264. Se parto de la dato estas nekonata, tiujn ciferojn oni reprezentas per la karaktro *u*; por seriaĵoj daŭre

[3] Eblus interkonsenti pri la maniero krei la nenormigitajn kodojn de la bibliotekoj. Ekzemple, litero(j) kiu(j) identigas la urbon, streko, tri literojn, kiuj identigas la bibliotekon. Laŭ tio, ĉi kodo: V-VEG, povus identigi la bibliotekon de la Valencia Esperanto-Grupo.

[4] https://www.loc.gov/marc/organizations/orgshome.html

publikigataj kaj por plurvolumaj eldonaĵoj daŭre publikigata, la pozicioj 008/11-14 enhavas 9999 por indiki ke tiu dato ankoraŭ ne disponeblas. Jen la plej ofte uzataj valoroj:

c – daŭra risurco publikigata *(por periodaĵoj daŭre publikigataj)*

008/06 c

008/ 07-10 1908

008/11-14 9999

264 #1 $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c1908-

d – fermita publikigaĵo *(por fermitaj periodaĵoj ne plu publikigataj)*

008/06 d

008/ 07-10 1928

008/11-14 1941

264 #1 $aNew York :$bXerox Films,$c1928-1941

m – pluraj datoj *(uzata kiam plurvoluma risurco estas eldonita laŭlonge de pluraj jaroj, se ĉiuj volumoj aperas en la sama jaro oni uzas la kodon "s").* Jen ekzemploj de la plej reprezentaj kazoj:

008/06 m

008/ 07-10 1940

008/11-14 1942

264 ## $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c1940-1942

[Plurvoluma risurco aperintaj en intervalo de datoj]

008/06 m

008/ 07-10 uuuu

008/11-14 1996

264 #1 $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c-1996

[Plurvoluma risurco de kiu ne disponeblas la unua volumo]

008/06 m

008/ 07-10 2005

008/11-14 9999

264 #1 $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c2005-

[Plurparta risurco daŭre publikigata]

008/06 m

008/07-10 1998

008/11-14 9999

260 ##$aBrescia : $bLa scuola,$c<c1998- >

[Plurparta risurco daŭre publikigata de kiu disponeblas nur unu meza volumo. La informo donita interkrampe estas provizora kaj povos ŝanĝiĝi kiam la risurco kompletiĝos.]

Kiam la dato de la unua volumo estas pli posta ol la dato de la aliaj volumoj, registru la datojn de la kampoj 008 kaj 264$c en kronologia ordo:

008 /06 m

008 /07-10 2006

008 /11-14 2008

264 $aMadrid :$bAnaya,$c2006-2008

300 ## $a3 volumoj

[Datoj de publikigo: v. 1, 2007; v. 2, 2006; v. 3, 2008]

q – duba dato (oni ne konas la ekzaktan daton sed eblas doni certan jar-periodon)

008/06 q

008/ 07-10 1963

008/11-14 1966

264 #1 $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c[inter 1963 y 1966]

r – datoj de represo/reeldono kaj de la originalo (008/07-10 enhavas la daton de la represo aŭ reeldono; 008/11-14 enhavas la daton de la originala eldono se konata. Se nekonata, 088/11-14 enhavas la kodon u (uuuu).

008/06 r

008/ 07-10 2003

008/11-14 1985

261 #1 $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c2003

534 ## $pReproduktaĵo de la eldono de: $cMadrido : HEF, 1985

s – unika dato konata/verŝajna (la dato povas esti reala, verŝajna, proksimuma aŭ deduktita; oni kodigas ĝin en 008/07-10; 008/11-14 enhavas blankojn (#).

008/06 s

008/ 07-10 2005

008/11-14 ####

264 #1 $aRoterdamo :$bUniversala Esperanto-Asocio,$c2005

Por pli detala uzo de ĉi pozicio, en kombino kun la sekvaj pridataj, vidu la koncernan sekcion de la formato[5].

07-10 Unua dato *(vidu la klarigon por la pozicio 06)*

[5] https://www.loc.gov/marc/bibliographic/bd008a.html

11-14 Dua dato *(vidu la klarigon por la pozicio 06)*

15-17 Loko de eldono, produktado aŭ fabrikado

[aa#] – alfabeta kodo dukaraktra *(Koha provizas aliron al la necesa MARC-kodaro por landoj[6])*

18-34 Kodigitaj elementoj por ĉiu tipo de materialo.

Vidu sube la elementojn por monografioj.

35-37 Lingvo

Temas pri la ĉefa lingvo de la dokumento. Se estas pli da lingvoj kaj pli ol unu kodo estas aplikebla, oni kompletigas la informon en la kampo 041 (vidu poste).

[aaa] – alfabeta kodo trikaraktra *(Koha provizas aliron al la necesa MARC-kodaro por lingvoj[7])*

39 Fonto de la katalogado

d – aliaj *(ĉi tiu estas la valoro uzenda de Esperanto-bibliotekoj)*

Pozicioj 18-34 specifaj por libroj

18-21 – Ilustraĵoj

Estas diversaj valoroj por la malsamaj tipoj de ilustraĵoj. Eblas uzi ĝis kvar el tiuj valoroj por detale kodigi la tipojn de ilustraĵoj. Tamen, tiomagrada detaligo kutime ne penvaloras kaj oni ĝenerale uzas nur unu el tiuj du valoroj kodigitaj en la unua pozicio:

- Sen ilustraĵoj

La risurco ne enhavas ilustraĵojn.

A – Ilustraĵoj

La risurco enhavas ilustraĵojn sed oni ne registras la konkretajn kodojn por la diversaj tipoj de ilustraĵoj.

22 – Celata publiko

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la intelektan kapablon de la celata publiko. Ĝenerale oni ne registras ĝin kaj lasas la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

23 – Formo de la eldonaĵo

Por presitaj materialoj la valoro estu ĉiam:

- Neniu el la sekvaj

Neniu el la aliaj kodoj aplikeblas.

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

[6] https://www.loc.gov/marc/countries/countries_code.html
[7] https://www.loc.gov/marc/languages/language_code.html

| - Oni ne intencas kodigi

Por brajlaj tekstoj uzu la kodon:

f – Brailo

24-27 – Naturo de la enhavo

Estas diversaj valoroj por la malsamaj tipoj de enhavoj. Eblas uzi ĝis kvar el tiuj valoroj por detale kodigi la naturon de la enhavo. Tamen, tiomagrada detaligo kutime ne penvaloras kaj oni ĝenerale uzas ĉi valoron kodigitan en la unua pozicio:

- Oni ne specifas la naturon de la enhavo.

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

28 – Oficiala eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas publikigita de aŭ por oficiala instanco (internacia, nacia, regiona, loka) aŭ de unu el ties dependaj organismo. Eblas tre detaligi la informon, tamen, la plej rekomenditaj valoroj estas:

- Ne estas oficiala eldonaĵo

o – Oficiala eldonaĵo-nivelo ne determinita

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

29 – Kongresoj

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco enhavas aŭ ne verkon konsitantan el la aktoj, raportoj, aŭ resumoj de iu kongreso. Oni ne konsideru kongreso la unuopajn prelegojn publikigitaj sendepende. La eblaj valoroj estas:

0 – Ne estas kongreso

1 – Estas kongreso

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

30 – Omaĝoj

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco estas aŭ ne omaĝo, nome, gratula aŭ memora eldonaĵo ĝenerale konsistanta el kolekto de eseoj aŭ kontribuoj biografiaj aŭ sciencan. La eblaj valoroj estas:

0 – Ne estas omaĝo

1 – Estas omaĝo

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

31 – Indekso

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco enhavas aŭ ne indekson. La eblaj valoroj estas:

0 – Ne enestas indekso

1 – Enestas indekso

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

32 – Ne difinita

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo

33 – Literatura formo

Kodo, kiu identigas la literaturan formon de la verko enhavata en la risurco. Eblas elekti numerkodojn por simple indiki ĉu temas pri fikcia verko aŭ ne, aŭ detaligi per literkodoj la tipon de literaturaĵo.

0 – Ne estas fikcio

1 – Estas fikcio

d – Teatro

e – Eseo

f – Romano

h – Humoro, satiro, ktp.

I – Leteroj

j – Noveloj, rakontoj

m – Miksaĵo

p – Poezio

s – Paroladoj

u – Nekonata

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

34 – Biografio

Ĉi pozicio indikas ĉu la risurco enhavas aŭ ne biografion. La eblaj valoroj estas:

– Ne enestas biografia materialo

a – Membiografio

b – Individua biografio (de unu persono)

c – Kolektiva biografio (biografioj de pli ol uno persono)

d – Enhavas biografian informon

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

Pozicioj 18-34 specifaj por komputilaj dosieroj

18 -21 – Ne difinitaj

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo.

22 – Celata publiko

Estas pluraj kodoj, kiuj priskribas la intelektan kapablon de la celata publiko. Ĝenerale oni ne registras ĝin kaj lasas la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

24-25 – Ne difinitaj

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo.

27 – Ne difinitaj

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo.

28 – Oficiala eldonaĵo

Oni indikas per kodo ĉu la eldonaĵo estas publikigita de aŭ por oficiala instanco (internacia, nacia, regiona, loka) aŭ de unu el ties dependaj organismo. Eblas tre detaligi la informon, tamen, la plej rekomendidaj valoroj estas:

- No estas oficiala eldonaĵo

o – Oficiala eldonaĵo-nivelo ne determinita

Eblas ankaŭ ne registri ĝin kaj lasi la implicitan valoron provizitan de la sistemo:

| - Oni ne intencas kodigi

29-34 – Ne difinitaj

Lasu la implicitan valoron provizitan de la sistemo.

Kampoj pri numeroj kaj kodoj

020 – ISBN (International Standard Book Number = Internacia Norma Libro-Numero) (R[8]).

Numero asignita al monografia eldonaĵo de la responda landa agentejo[9]. Ĝi kreiĝis en 1970 kiel unika identigilo por libroj.

La numero povas konsisti el dek ciferoj (la plej malnovaj), aŭ el dek tri ciferoj (ekde 2007). La 10-ciferan numeron konstituas kvar grupoj disigitaj per streko (la cifero lasta estas kontrolnumero por aŭtomata validigo); la unua grupo identigas la landon aŭ la lingvon, la duan identigas la eldonejon, kaj la trian la

[8] N aŭ NR indikas ĉu la subkampo estas ripetebla aŭ ne.
[9] *International ISBN Agency* (Internacia ISBN-Agentejo): https://www.isbn-international.org/esp/index.html

konkretan eldonon de iu titolo. La 13-ciferan numeron konstituas kvin grupoj, el kiuj la unua estas EAN[10]-prefikso, kiu identigas la libro-industrion; la cetero funkcias same kiel en la 10-cefera numero.

La kampo povas enhavi nevalidajn numerojn kaj ankaŭ indiki al kiu parto de la eldonaĵo la numero apartenas. Ĝi estas ripetebla por la pluraj numeroj asociitaj al iu risurco.

Indikiloj:

1a nedifinita *(entenas blankon #)*

2a nedifinita *(entenas blankon #)*

Subkampoj (ĉefaj):

$a ISBN (NR)

$q Aldona informo (R)

$z Nevalida aŭ nuligita numero (R)

020 ## $a84-7635-597-1

020 ## $a978-84-6523-841-0$q(kompleta verko)

020 ## $a978-84-6523-842-X$q(volumo 1)

020 ## $a978-84-6523-594-0$z978-84-6532-594-0

[La numero aperanta en la risurco estas erara kaj eblis trovi la ĝustan per aliaj rimedoj]

040 – Fonto de la katalogado (NR)

MARC-kodo aŭ nomo de la organizo kiu kreis la rikordon, transskribis ĝin en formato legebla per komputilo aŭ modifis la ekzistantan MARC-rikordon (krom se oni nur aldonis datenojn pri la ekzempleroj). La datenoj de ĉi kampo kaj la kodo 008/39 (Fonto de la katalogado) identigas la centron responsan pri la bibliografia rikordo. Vidu: MARC Codes for Organizations[11]. (Vidu ankaŭ la aneksaĵon pri Z39.50).

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Subkampoj:

$a Origina kataloga centro *(kodo aŭ nomo de la centro, kiu kreis la originan rikordon)*

$b Lingvo de katalogado. La uzata lingvo por la registrado de tiuj datenoj, kiujn oni ne transskribas el la risurco (notoj, fizika priskribo, aldonaj klarigoj), nome, la lingvo de la katalogo *(kodo prenita de la responda MARC-kodaro[12])*

[10] Internacia Varnumero (origine Eŭropa Varnumero aŭ en angla *European Article Number*, sed nuntempe renomita *International Article Number*, kvankam oni pluhavas la mallongigon EAN).
[11] https://www.loc.gov/marc/organizations/org-search.php
[12] https://www.loc.gov/marc/languages/language_code.html

$c Transskribinta centro *(kodo aŭ nomo de la centro, kiu transskribis ĝin en formato legebla per komputilo, kiu povas esti la sama aŭ alia ol tiu registrita en $a)*

$d Modifinta centro *(kodo aŭ nomo de la centro, kiu modifis la rikordon; oni ne konsideras modifon la nuran aldonon de informo pri ekzempleroj; se estas pluraj sinsekvaj modifoj far malsamaj katalogaj centroj, la kodo de ĉiu centro iras en malsama $d sed oni ne ripetas la subkampon se la sama kodo aŭ nomo aperus en apudaj $d-subkampoj)*

$e Priskriba normaro *(MARC-kodo aŭ nomo de la kataloga regularo uzata por krei la rikordon)*

008/39 **d** *(alia biblioteko aŭ kataloga agentejo malsama de nacia biblioteko aŭ kataloga kunlabora programo)*

040 ## $aES-MaBJR$bepo$cES-MaBJR$erda

[rikordo kreita kaj transskribita de Biblioteko Juan Régulo Pérez, en Esperanto, per RDA]

008/39 **#** *(iu nacia biblioteko)*

040 ## $aSpMaBN$bspa$cSpMaBN$dES-MaBJR$erda

[rikordo kreita kaj transskribita de la Nacia Biblioteko de Hispanio, en la hispana kaj modifita de Biblioteko Juan Régulo Pérez por adapti ĝin al sia katalogo].

041 – Lingvokodo (R)

En la kampo 041 oni registras la kodojn de la lingvoj asociitaj al iu risurco, kiam la indiko en 008/35-37 ne sufiĉas por doni kompletan informon. Oni povas ankaŭ registri la lingvon en la 546 en formo de noto.

La kampo 041 uzatas, do, kune kun 008/35-37. La kodon registritan en 008/35-37 oni indikas ankaŭ en 041 kiel unua kodo en subkampo $a.

La kampon 041 oni uzas kiam ekzistas unu aŭ pli el la sekvaj kondiĉoj:

- La risurco enhavas pli ol unu lingvo.
- La risurco estas traduko aŭ enhavas ĝin.
- La lingvo de la resumoj aŭ akompanaj materialoj kaj la ĉefa risurco malsamas.

La kampo 041 utilas ankaŭ por indiki la originalan lingvon de la verko, aŭ tiu de la meza traduko.

En plurligvaj risurcoj, la kodojn oni registras laŭ ordo de graveco (ĝenerale identigita per la amplekso) ene de ĝi. Se neniu lingvo elstaras super la aliaj, oni kodigas ilin laŭ alfabeta koda ordo. Se la kataloga centro elektis la kodon *mul* por 008/035-37, en la kampo 041 oni indikas la kodon por la titolo (aŭ la unua titolo se estas pli ol unu) krom la kodon *mul*. Eblas ripeti la subkampon $a por inkludi ĉiujn lingvokodojn, sed kutime, kiam estas pli ol ses oni uzas la kodon *mul*.

Indikiloj:

1a: Indiko pri traduko

- oni ne donas informon

0 - La risurco ne estas traduko kaj ne enhavas ĝin

1 - La risurco estas traduko aŭ enhavas ĝin

2a: Fonto de la kodo

- MARC-kodo pri lingvo *(ĉi tiu estas la valoro uzenda de Esperanto-bibliotekoj)*

7 – Fonto indikita en la subkampo $2 *(se ne temas pri MARC-kodo)*

Subkampoj

$a Lingvokodo de la teksto/sonregistraĵo aŭ sendependa titolo (R)

$b Lingvokodo de la resumo (R)

$d Lingvokodo de la kantata aŭ parolata teksto (R)

$e Lingvokodo de la libreto (R)

$f Linvokodo de la enhavtabelo (R) *(se ĝi malsimilas de tiu kodigita en $a)*

$g Lingvokodo de la aldona materialo se ne temas prilibretoj (R)

$h Lingvokodo de la originala lingvo (R)

$j Lingvokodo de la titolaldonoj (R)

$k lingvokodo de la mezaj tradukoj (R)

$m Lingvokodo de la originala aldona materialo se ne temas pri libretoj (R)

$n Lingvokodo de la originala libreto (R)

$2 Fonto de la kodo (NR)

La plej uzataj estas **$a**, **$b**, **$h** kaj **$k**.

008/35-37 **eng**

041 ## $a**eng**$aepo$afre

[La risurco estas en la angla, Esperanto kaj la franca, sed oni ne indikas ĉu ĝi estas aŭ enestas en ĝi traduko]

008/35-37 **epo**

041 0# $a**epo**$aspa

[La risurco estas en Esperanto kaj la hispana, ne enestas traduko]

008/35-37 **epo**

041 1# $a**epo**$hrus

[La risurco estas en Esperanto, tradukita el la rusa, kiu estas la originala lingvo]

008/35-37 **epo**

041 0# $a**epo**$aeng

[La risurco estas en Esperanto kaj la angla, ne estas traduko]

008/35-37 **spa**

041 1# $a**spa**$beng$hepo

[La risurco estas en la hispana, kun resumo en la angla, tradukita el Esperanto, kiu estas la originala lingvo]

008/35-37 **mul**

041 0# $a**mul**$aepo

[La risurco estas en pluraj lingvoj sed neniu el ili elstaras, la titolo estas en Esperanto]

008/35-37 **epo**

041 1# $a**epo**$hrus$kger

[La risurco estas esperanta traduko de germanlingva teksto originale publikigita en la rusa]

008/35-37 **epo**

041 1# $a**epo**$aspa$hspa

[La risurco enhavas esperantan tradukon de originala hispanlingva teksto inkludita ankaŭ en la eldonaĵo]

Kampoj rilataj al la bibliografia priskribo

240 – Unuforma titolo (NR)

En ĉi kampo oni kodigas la preferatan titolon de verko, kiam la ĉefa alirpunkto estas nomo de persono (100), de korporacio (110) aŭ de kongreso (111).

Malgraŭ tio, ke temas pri preferataj titoloj, la mastrumsistemoj ĝenerale ne kontrolas ilin. Ankaŭ ne Koha. Cetere, temas pri, ni diru, “tranĉita” aŭtoritato. En la datenbanko oni kreas la aŭtoritaton kompleta, sed en la bibligrafia rikordo oni ĉerpas nur la parton de la aŭtoro. Ĉiel ajn, la parto de la titolo devas esti laŭregule kreita en la bibliografia rikordo, sendepende de tio, ĉu oni kreis la aŭtoritaton aŭ ne.

Indikiloj:

1a: Printado aŭ vidigo

0 – Oni ne printas nek vidigas ĝin

1 – Oni printas aŭ vidigas ĝin *(uzenda ĉiam)*

100 1# $aAbout, Edmond

240 **1**0 $aRoi des montagnes.$lEsperanto

2a: Karaktroj ne alfabetigendaj *(vidu pli detalan klarigon en kampo 245)*

0-9 - Nombro de karaktroj nealfabetigendaj

100 1# $aAïvanhov, Omraam Mikhaël

240 1**3** $a**Le** yoga de la nutrition. Esperanto

Ĉefaj subkampoj

$a – Unuforma titolo (NR)

100 1# $aAuld, William

240 13 $aLa fenomeno Esperanto

$k – Forma subdivido (NR)

100 1# $aGoethe, Johann Wolfgang von

240 10 $aIphigenie auf Tauris.$kElektaĵo

$l – Lingvo de la verko (NR)

100 1# $aBalzac, Honoré de

240 10 $aEugénie Grandet.$lEsperanto

$n – Numero de la parto aŭ sekcio de verko (R)

100 0# $aHomero

240 10 $aOdiseado.$nKanto 1

$p – Nomo de la parto aŭ sekcio de verko (R)

100 1# $a Asensio, Elena

240 10 $aCatalogación.$pPartituras

243 – Kolektiva unuforma titolo (NR)

En ĉi kampo oni kodigas la preferatan kolektivan titolon de verko, kiam la ĉefa alirpunkto estas nomo de persono (100), de korporacio (110) aŭ de kongreso (111).

Malgraŭ tio, ke temas pri preferataj titoloj, la mastrumsistemoj ĝenerale ne kontrolas ilin. Ankaŭ ne Koha. Cetere, temas pri, ni diru, “tranĉita” aŭtoritato. En la datenbanko oni kreas la aŭtoritaton kompleta, sed en la bibligrafia rikordo oni nur ĉerpas la parton de la aŭtoro. Ĉiel ajn, la parto de la titolo devas esti laŭregule kreita en la bibliografia rikordo, sendepende de tio, ĉu oni kreis la aŭtoritaton aŭ ne.

Indikiloj:

1a: Printado aŭ vidigo

0 – Oni ne printas nek vidigas ĝin

1 – Oni printas aŭ vidigas ĝin *(uzenda ĉiam)*

100 1# $aGarcía Lorca, Federico

243 **1**0 $aPoezio.$lEsperanto

2a: Karaktroj ne alfabetigendaj *(vidu pli detalan klarigon en kampo 245)*

0-9 - Nombro de karaktroj nealfabetigendaj

100 1# $aAïvanhov, Omraam Mikhaël

243 1**0** $a**Verkaro**.$lEsperanto

Ĉefaj subkampoj

$a – Unuforma titolo (NR)

100 1# $aZamenhof, L. L.

243 10 $aVerkaro

$k – Forma subdivido (NR)

100 1# $aGoethe, Johann Wolfgang von

243 10 $aPoezio.$kElektaĵo

$l – Lingvo de la verko (NR)

100 1# $aSchiller, Friedrich

243 10 $aPoezio.$kElektaĵo.$lEsperanto

245 – Mencio pri titolo kaj mencio pri respondeco (NR)

Ĉi kampo respondas al la *areo* pri titolo kaj mencio pri respondeco de la bibliografia priskribo de risurco, laŭ ISBD-terminologio; kaj al la atributoj de manifestiĝo *titolo* kaj *mencio pri respondeco* laŭ RDA-terminologio.

La kampo konsistas el la ĉeftitolo de la risurco, resto de la titolo kaj mencio pri respondeco, kaj, en malnovaj rikordoj, ĝi ankaŭ povas enhavi informon pri la tipo de materialo[13].

La ĉeftitolo estas la titolo propra de risurco, nome, la titolo en la formo, kiun ĝi havas en la ĉefa fonto de informo. La ĉeftitolo povas inkludi alternativajn titolojn kaj numeron de la parto aŭ sekcio kaj la nomon de la parto, sed ne paralelajn titolojn aŭ titolaldonojn.

Indikiloj:

1a: Aldona alirpunkto de titolo

0 - Ne estas aldona alirpunkto *[Oni uzas ĝin kiam ne estas alirpunkto 1XX, t.e., kiam la ĉefa alirpunkto estas la ĉeftitolo]*

245 **0**0 $aDonkiĥoto parolas Esperanton

245 **0**0 $aKonciza historio de la ĉina Esperanto-movado

[13] En RDA tiu subkampo estas anstataŭita de aliaj kampoj, kiuj ebligas pli ampleksan detaligon pri la tipo de materialo: Tipo de enhavo (336), Tipo de medio (337), Tipo de portilo (338). Vidu ilin sube.

1 - Estas aldona alirpunkto *[Oni uzas ĝin kiam estas alirpunkto 1XX]*

100 1 $aAuld, William

245 **1**0 $aPaŝoj al plena posedo

2a: Karaktroj nealfabetigendaj

0 - Ne estas nealfabetigendaj karaktroj

245 0**0** $aSanga nupto

1-9 - Nombro de karaktroj nealfabetigendaj *[La titolo komenciĝas per artikolo, kiun oni ne prikonsideras por la alfabetigo de la titolo. Kiu ajn diakritaĵo, spaco aŭ interpunkcia signo antaŭantaj la artikolon ankaŭ estas konsiderataj kiel ne alfabetigenda; tamen la samaj signoj antaŭantaj la unuan alfabetigenda karaktro ne estas konsiderataj ne alfabetigendaj karaktroj]*

245 1**3** $aLa familio de Pascual Duarte

*[Alfabetigado de la titolo devas esti per "familio", do, ĝi ne prikonsideru la artikolon plus la intervorta spaco: **La#**, tial la 2a indikilo estas 3]*

245 0**0** $a¿Qué es el esperanto?

[La sistemo ne enkalkulas la demandosignon antaŭ la unua vorto de la titolo, do, ĉar ne estas artikolo, la valoro bezonata por la dua indikilo estas 0]

245 0**0** $a"Edinburgh" Esperanto pocket dictionary

[Simile al la antaŭa kazo, sed...]

245 0**5** $aThe "Edinburgh" Esperanto pocket dictionary

[... ĉar estas artikolo ne alfabetigenda, oni devas averti al la sistemo pri tiuj pliaj karaktroj nealfabetingendaj antaŭ Edinburgh: the#", entute kvin karaktroj*]*

Ĉefaj subkampoj

$a Ĉeftitolo (NR)

En la subkampo $a oni kodigas la ĉeftitolon, escepte de la numero aŭ nomo de la parto kaj la de la alternativa titolo. La subkampo $a ankaŭ povas enhavi la unuan titolon de risurco konsistanta el aro de verkoj sen kolektiva titolo.

Ĝi enhavas ĉiun titolan informon ĝis la unua interpunkcia signo kaj inkluzivas ĝin: egalsigno (=), dupunkto (:), klinita streko (/), punktokomo (;), punkto (.), aŭ komo (,).

245 00 $a Premiitaj tezoj

245 10 $a Maja nokto aŭ La dronintino

245 13$a La divina commedia =$b

245 13 $aLa infana raso :$b

245 10 $a Du junaj fraŭlinoj ;$b

245 10 $a Verkaro de V. N. Devjatnin (rusa esperantisto).$n

245 10 $aMerlo sub menhiro /$c

$b Resto de titolo (NR)

Temas pri kompleksa subkampo, kiu povas enhavi plej diversajn tipojn de informo. Ĝi povas inkludi paralelajn titolojn, titolojn sekvantajn la unuan (en risurcoj sen kolektiva titolo) kaj titolaldonojn. Ĝi enhavas ĉiujn datenojn, kiuj sekvas la unuan interpunkcian signon (kodigitan en la antaŭa subkampo), ĝis la signo kiu enkondukas la mencion pri respondeco (/).

La subkampo $b estas ne ripetebla, tio estas, oni ne ripetas ĝin kiam en la kampo estas pli ol unu paralela titolo, alia(j) titolo (j) kaj/aŭ pli ol unu titolaldono.

245 13$a La divina commedia **=$b**La dia komedio /$c…

245 10 $aDu junaj fraŭlinoj **;$b**kaj Korneliino **:** du noveloj el la bonekzemplaj /$c…

245 13 $a La orelringo **:$b**ajnaĵo **;** Ŝimstatoj **:** poemoj /$c…

245 10 $a Saturno **:$b**poemas bilingües **=** dulingvaj poemoj/$c…

245 10 $aEnkonduko en la teorion de lingvaj ludoj **:$b**ĉu mi lernu esperanton? **=** Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele **:** soll ich Esperanto lernen? /$c…

$c Mencio pri respondeco, ktp. (NR)

Plia ne ripetebla subkampo. Ĝi povas enhavi la unuan mencion pri respondeco kaj/aŭ ceterajn informojn rilatajn al la kampo 245 ne kodigeblaj en la aliaj subkampoj. La subkampo $c inkludas ĉiujn datenojn, kiuj sekvas la klinitan strekon (/). Ĉi subkampo ĉiam estas la lasta kaj ne eblas kodigi iun ajn alian subkampon post ĝi.

245 10 $aSur la spuroj de Federico García Lorca **/$c**Miguel Fernández

245 13 $aLa tempesto **/$c**William Shakespeare **;** tradukis K. Kalocsay

245 10 $aElementa kurso pri astronomio **/$c**David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel

245 10 $aVetero kaj klimato de la mondo **/$c**Denis Riley, Lewis Spolton **;** el la angla tradukis Kris Long

245 14$aThe analysis of the law **/$c**Sir Matthew Hale**.** The students companion **/** Giles Jacob

$n Numero de la parto aŭ sekcio de la verko (R)

La numerado estas difinita kiel indiko de sinsekvo en kiu ajn formo, ekzemple: Parto 1, Suplemento, Dua libro. La subkampon $n antaŭas punkto (.), krom se la antaŭa vorto de la antaŭ subkampo estas mallongigo aŭ dateno finiĝantaj mem per punkto.

245 10 $aJudita**.$n**Libro unua

245 10 $aNeforgeseblaj tagoj**.$n**Dua parto

245 10 $aRakontoj, ktp.**$n**Kajero 3

[La punkto antaŭ $n ne estas ISBD-interpunkcio, sed parto de la mallongigo kodigita en la antaŭa subkampo]

$p Nomo de parto aŭ sekcio de verko (R)

Nomo de parto aŭ sekcio de verko en titolo. La subkampon $p antaŭas punkto (.) se ĝi iras post la subkampoj $a, $b aŭ alia subkampo $p; la subkampon $p antaŭas komo (,) se ĝi iras post subkampo $n.

245 10 $aEtimologia vortareto pragmata de Esperanto**.$p**Suplemento

245 10 $aKonkordanco al la Krestomatio**.$n**Unua parto**,$p**La participoj

245 13$aLa genia kavaliro Don-Kiĥoto de Manĉujo**.$n**(Unua parto)**.$n**Ĉapitro XXIIa**,$p**Pri la libero, kun Don-Kiĥoto donis al multaj malfeliĉuloj, kiujn oni malvolonte portis, kien ili ne volus iri

250 – Mencio pri eldono (R)

En ĉi kampo oni kodigas la informon rilatan al la eldono de verko.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

$a Mencio pri eldono

La mencio pri eldono kutime konsistas el numero kaj akompana vorto kaj/aŭ mallongigo. Se mencio pri eldono aperas en pli ol unu lingo, nur la unuan mencion oni registras en $a. Ĝi enhavas ĉiun titolan informon ĝis la unua interpunkcia signo kaj inkluzivas ĝin: egalsigno (=), klinita streko (/).

250 ## $a3a eldono

250 ## $aDua eldono, dua represo

250 ## $aTria ofseta represo laŭ la dua eldono

250 ## $aDua reviziita eldono =$b…

250 ## $a2a eld. /$b…

$b Resto de la mencio pri eldono.

Ĝenerale temas pri mencio pri respondeco kaj/aŭ paralela mencio pri eldono

250 ## $aUnua eldono **=$bPrimera edición**

250 ## $a3a eldono **/$breviziita de Paul Watson**.

264 – Produktado, Publikigo, Distribuado, Fabrikado kaj Kopirajto (R)

En ĉi kampo oni kodigas la menciojn pri produktado, publikigo, distribuado, fabrikado kaj kopirajto. Por simpligi la klarigojn, nur la indikojn pri la eldonisto estas menciata, sed ĉio funkcias same por la produktanto, la distribuanto aŭ la fabrikanto (presisto en tekstaj materialoj).

Indikiloj

1a: Sinsekvo de mencioj

- Ne aplikebla, aŭ oni ne donas informon, aŭ unua disponebla eldoninto.

En monografioj oni uzas ĉiam ĉi indikilon, eĉ se ŝanĝiĝas la eldonisto en plurvolumaj verkoj.

En seriaĵoj oni uzas ĝin se la eldoninto ne ŝanĝiĝas laŭlonge de la publikado aŭ por indiki la unuan.

2 – Intera eldonisto

Uzata en seriaĵoj kiam ŝanĝiĝas la eldoninto aŭ la loko eldono. Ĝi indikas la eldonintojn en interaj jaroj.

3 – Nuna/lasta

Uzata en seriaĵoj kiam ŝanĝiĝas la eldoninto aŭ la loko de eldono. Ĝi indikas la nunan eldonanton, aŭ la lastan se la seriaĵo estas jam fermita.

2a: Funkcio de la korporacio

0 – Produktado (la kampo enhavas mencion pri nepublikigita risurco).

1 – Publikigo (la kampo enhavas mencion pri la publikigo de risurco: eldonloko, eldonisto/eldoninto, eldonjaro).

2 – Distribuado (la kampo enhavas mencion pri la distribuado de risurco)

3 – Fabrikado (la kampo enhavas mencion pri la fabrikado (presado, ktp.) de risurco

4 – Kopirajto (la kampo enhavas daton ligitan al kopirajto; ĝi ankaŭ rilatas al la dato de fonogramo por sonrisurcoj)

Ĉefaj subkampoj

$a – Loko de produktado, publikigo, distribuado aŭ fabrikado. (R)

La subkampo $a inkludas la datenojn ĝis la unua ISBD-interpunkcia signo (dupunkto (:) kiam la subkampon $a sekvas subkampo $b kaj punktokomo (;) kiam la subkampon $a sekvas alia subkampo $a).

264 #1 $aNew York, N.Y. **:$b**Elsevier,$c1984.

260 #1 $aNew York **;$a**Berlin :$bSpringer Verlag,$c1977

$b – Nomo de produktanto, eldoninto, distribuanto aŭ fabrikinto (R).

La subkampo $b ĉiam iras antaŭata de dupunkto (:) kaj inkludas la datenojn ĝis la ISBD-interpunkcia signo, kiu antaŭas la sekvan elementon (komo (,), kiam la subkampon $b sekvas subkampo $c; dupunkto (:) kiam ĝin sekvas alia subkampo $b; aŭ punktokomo (;) kiam ĝin sekvas alia subkampo $a).

264 ## $aNew York :$bAmerican Statistical Association**,$c**1975

264 #1 $aRoterdam :$bUniversala Esperanto-Asocio **:$**bVeenman Drukkers B.V.**,$c**1981

261 #1 $aParis :$bGauthier-Villars **;$a**Chicago :$bUniversity of Chicago Press**,$c**1955.

$c – Dato de produktado, eldonado, distribuado aŭ fabrikado, aŭ dato de kopirajto.

La subkampo $c ĉiam iras antaŭata de komo (,), krom se ĝi estas la unua subkampo de la kampo 264.

264 #1 $aNew York :$bAmerican Statistical Association**,$c**1975

264 #4 **$c**©2002

264 #4 **$c**℗1983

Estas pli da klarigoj en la respondaj ĉapitroj de ĉia materialo.

300 – Fizika priskribo (R)

La kampo utilas por doni fizikan priskribon de la risurco kiel la amplekson, la dimensiojn, aliajn fizikajn detalojn kaj priskribon de la aldona materialo.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

$a Amplekso

La amplekso de la risurco ofte konsistas el nombro de paĝoj kaj/aŭ de volumoj (presaĵoj), totala tempo de reproduktado (son- kaj videoregistraĵoj), ktp.

La subkampo $a enhavas la informon ĝis la sekva ISBD-interpunkcia signo (dupunkto (:) se estas subkampo $b); punktokomo (;) se ne estas subkampo $b).

300 ## $a149 paĝoj **;$c**23 cm

300 ## $a3 volumoj (657 paĝoj) **:$b**ilustraĵoj ;$c24 cm

$b Aliaj fizikaj detaloj

Temas pri fizikaj karakterizaĵoj kiaj ilustraĵoj, koloro, rapideco de reproduktado, prezentformato de filmo, ktp.

La subkampon $b antaŭas la ISBD-interpunkcia signo dupunkto (:) kaj enhavas la informon ĝis la sekva ISBD-interpunkcia signo, punktokomo (;).

300 ## $a104 paĝoj **:$b**fotografaĵoj ;$c20 cm

$c Dimensioj

Temas pri la mezuroj de la risurco esprimataj en centimetroj aŭ milimetroj.

La subkampon antaŭas la ISBD-interpunkcia signo punkto komo (;) kaj enhavas la informon ĝis la sekva ISBD-interpunkcia signo, plus-signo (+), se ĝi ekzistas.

300 ## $a149 paĝoj **;$c**23 cm

300 ## $a271 paĝoj :$bilustraĵoj **;$c**10 x 27 cm

$e Akompana materialo

La subkampo povas inkludi fizikan priskribon de la akompana materialo parenteze. Ĝi iras ĉiam antaŭata de plus-signo (+).

300 ## $a271 paĝoj :$bilustraĵoj ;$c21 cm **+$e**1 CD-ROM

300 ## $a314 paĝoj ;$c25 cm **+$e**1 broŝuro (25 paĝoj : ilustraĵoj ; 15 cm)

336 – Tipo de enhavo (R)

Formo de komunikado per kiu verko estas esprimita. Uzita kune kun 000/06 (Tipo de rikordo), kiu indikas la ĝeneralan specon de enhavo de la risurco. La informo kodigita en la kampo 336 ebligas konkretigi la tipon de enhavo de la risurco.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:

$a Tipo de enhavo

Enhavas la terminon, kiu priskribas la katalogatan risurcon, prenitan el fermita terminaro[14].

336 ## $aTeksto

336 ## $aMuziko interpretita

Eblas agordi la la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita per implicita termino aŭ por ke la termino estu elektebla el terminaro prezentita per faldebla menuo.

$2 Fonto

MARC-kodo, kiu identigas la terminaron uzatan por registri la tipon de enhavo.

336 ## $aTeksto$2rdacontent

336 ## $aMuziko interpretita$2rdacontent

En rikordoj kreitaj laŭ RDA, tiu kodo ĉiam estos *"rdacontent"*. Eblas agordi la la sistemon por ke ĉi subkampo estu aŭtomate plenigita kaj prezentu ĉiam la kodon implicite.

$3 Specifitaj materialoj

Parto de la katalogata risurco al kiu la termino aplikeblas en risurcoj kun pluraj tipoj de medioj.

336 ## $3Presaĵo$aTeksto$2rdacontent

336 ## $3CD-Audio$aMuziko interpretita$2rdacontent

[La risurco konsistas el libro akompanata de CD-Audio kun kantoj]

337 – Tipo de medio (R)

Indikas la ĝeneralan tipon de peranta aparato necesa por vidi, aŭskulti, spekti, ktp., la enhavon de la katalogata rimedo. Aŭ la neneceso de tia perado.

Indikiloj:

Nedifinitaj, ambaŭ entenas blankon (#)

Ĉefaj subkampoj:
